Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Marto 1997 — 68-a jaro, n-ro 3 (1101)


ISSN 1163.0442 — *Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem* — MENSUEL/MONATA

Disfalo de la S.F.R.J.

Aŭtoroj de la dramo
(nun ĉiuj estroj de la novaj ŝtatoj)

EN ĈI-NUMERO

- ❐ S.F.R.J kaj venko de naciismoj
- ❐ Kiam la vortoj elĉerpiĝas
- ❐ Liberecana Frakcio de SAT
- ❐ El niaj fratorganizoj - L.E.A.-oj
- ❐ Por revigligi nian asocion
- ❐ Pri klasbatalo kaj aliaj proble-moj
- ❐ SAT-ano 100-jara
- ❐ Novaĵoj tra Internet
- ❐ Retoklubo por E-infanoj
- ❐ SAT-Erinaco
- ❐ El Esperanto-movado



SAT SUR TTT : http://www.worldnet.net/~sat-esp/

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

EL LA REDAKTEJO

Karaj gekamaradoj,

En tiu ĉi unua printempa numero de la jaro 97, ni unue bondeziras al ĉiuj niaj kamaradinoj okaze de la ***8-a de Marto, Internacia virina tago****. La duono, (aŭ preskaŭ), de la SAT-anaro estas virinoj, sed ili ne estas sufiĉe reprezentitaj en la SAT-instancoj kaj eĉ en nia ĵurnalo. Pro tio, mi invitas niajn kamaradinojn pli aktive partopreni en la vivo de SAT kaj verki por Sennaciulo. Almenaŭ en nia demokrata asocio ni donu ekzemplon al aliaj, kaj montru la egalecon de seksoj en ĉiuj flankoj kaj partoj de la asocia vivo. Karaj kamaradinoj, jen, nun vi havas vorton!*

Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo : 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, Telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
E-poŝto : sat-esp@worldnet.net.
Oficejo malfermita : lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo : 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto : SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas : Redakta komitato - J. Bannier, P. Lévy kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo : SAT, 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, Francio.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, F-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication : Yves PEYRAUT.
Abonnement annuel/jara abono, France : 320 FF.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

KULTURA ASOCIO ESPERANTISTA
kae
ASSOCIACIÓ CULTURAL ESPERANTISTA
Montseny, 5. E - 08208 SABADELL

La 3-an de februaro 1997

Al la Direkcio, respektive Redakcio de
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA = SAT
67, Avenue Gambetta
FR-75020 PARIS

Karaj kamaradoj,

La subskribintaj SAT-anoj, je propra nomo kaj tiu de la organizo : "Kultura Asocio Esperantista" = KAE, energie protestas pro la neoportuna apero, en la cetere bonvena nova rubriko "EL ESPERANTO-MOVADO", de la tiel nomata "rugbeo-pilka", aŭ "ovala" surogato, anstataŭ la de Zamenhof aprobita insigno verdastela, jam tutmonde konata kiel vera simbolo de nia Esperanto.
Tiu "ovala" vinjeto estas niaopinie - kaj ne la solaj kun sama kriterio - neakceptebla kiel anstataŭigo de la tradicia "verda stelo", signo facile distingebla, krome tre adekvata, ĉar ja signifanta la kvin mondopartojn, kiujn celas Esperanto.
Esperante, ke vi komplezos nian justan peton, SAT-ane vin salutas :

Ramon Manau Torres, Vincento Hernàndez Llusera kaj José Ma Galofr'Domingo

SAT-Amikaro
67 av. Gambetta
75020 Paris

Paris, le 5-an de februaro 1997

Al Plenum-Komitato de S.A.T.

Karaj gekamaradoj,
La Komitato de SAT-AMIKARO, unuanime, deziras esprimi sian plenan subtenon al la P.K. de S.A.T., pri la aperigo en "SENNACIULO" (januaro 1997) de Publika Letero al Komunista Esperantista Kolektivo (K.E.K.).
Ni salutas vin kamaradece,

Por la Komitato de SAT-AMIKARO,

R. Grandière (21.679)

Kamarado Jacques Bannier, membro de la Redakta komitato deziras sciigi, ke li kontraŭis al la aperigo de aliaj reagoj en la februara numero de Sennaciulo post la apero de respondo de KEK.



El la Mondo

JUGOSLAVIO

Ivan MOĈILNIK

S.F.R.J. KAJ VENKO DE NACIISMOJ

La homaro baldaŭ prifestos komenciĝon de la 21-a jarcento, la ŝtatestroj brue parolas pri la homaj rajtoj kaj demokratio, sed oni tamen dum kelkaj jaroj tre kruele militis en la suda parto de Eŭropo, sur teritorio de la eksa Jugoslavio. Anstataŭ la granda kaj ŝajne tamen perspektiva S.F.R.J., sur Balkanio aperis kvin novaj kaj certe ne tro sendependaj ŝtatetoj - Kroatio, Slovenio, Bosnio kaj Hercegovino (mallonge kutime BkH), Makedonio kaj nova Jugoslavio (federacio de Serbio kaj Montenegro). BkH nun apartenas al iaspeca konfederacio. Post longa kaj tragika milito ĝi nun konsistas el du malforte ligitaj regionoj - Muzulman-Kroata Federacio kaj Respubliko Srpska. Stariĝas pluraj demandoj : ĉu tiun militon eblis eviti, kiu ĝin inspiris, al kiu ĝi utilis ? Ĉu jugoslavismo (= sudslavismo) estis nur bela utopio, ĉu vera neceso, ies intereso aŭ nur lerta trompo ?

Evoluo de sudslavismo

La prauloj de la Slavoj nuntempe vivantaj en la suda Eŭropo vivis ĝis la 6-a jarcento sur teritorioj de la nuna Polio kaj okcidenta Rusio, kiam pro oftaj atakoj de la Hunoj kaj aliaj agresemaj Aziaj gentoj ili komencis migri al pli sudaj partoj de la kontinento. Ties translokiĝo finiĝis ĝis la 8-a jarcento, kaj sur la nuna Balkanio formiĝis baldaŭ la unuaj Slavaj ŝtatetoj. Sed la sorto de tiuj etaj ŝtatoj ne estis feliĉa, kaj la regiono de Balkanio dum pluraj postaj jarcentoj estis dividita inter du tiamaj potencoj - Aŭstrio (pli poste Aŭstri-Hungario) kaj Turkio.


La socia kaj kultura vivoj de la sudaj Slavoj evoluis laŭ la ekzistantaj cirkonstancoj, ion ili retenis el la pasinto, multo estis akceptita de la najbaroj kaj la mastroj. Ĉiukaze dum la pasinta tempo en la regiono plene formiĝis kelkaj naciaj grupoj kun sufiĉe proksimaj sed tamen ne la samaj lingvoj, kun malsamaj skriboj (cirila kaj latina) kaj diferencaj religioj (katolikoj, ortodoksoj kaj islamanoj). Ŝajnas ke ĝuste tiu malsameco kaŭzis postajn novajn kaj neatenditajn problemojn.

Tra la historio la sudaj Slavoj teritorie kaj familie miksiĝis, precipe en Bosnio, ofte kunlaboris kaj eĉ kune batalis kontraŭ la malamikoj. Oni bedaŭrinde ankaŭ inter si militis, precipe dum la Unua mondmilito, kiam Kroatoj, Slovenoj kaj multaj Serboj estis mobilizitaj en Aŭstria armeo kaj batalis kontraŭ la tiama reĝlando Serbio.

Tamen, post plurjarcenta vivo sub la forta influo de Germana kaj Turka lingvoj kaj kulturoj, kaj certe ĝuante malpli da rajtoj ol estis la rajtoj de la regantaj nacioj, la Slavoj komencis strebi al la unuigo de propraj fortoj. Kial la popoloj, proksimaj laŭ la deveno, moroj, lingvoj, kun similaj malbonaj historiaj spertoj, ne povus kune, pli juste kaj pli sekure vivi en iu nova granda ŝtato - ŝtato de la Sudaj Slavoj ? Ĉu jam ne unuiĝis pluraj germanlingvaj ŝtatetoj ? Ĉu io simila ne okazis en Italio ? La entuziasmo iom post iom kreskis kaj post disfalo de Aŭstri-Hungario en 1918 vere aperis la reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj (ekde 1929 la Reĝlando Jugoslavio).



Negranda pasto por grandaj apetitoj



El la Mondo

Komuna ŝtato Jugoslavio

La fondon de granda ŝtato certe favoris la tiamaj junaj burĝaroj, sed la progresemuloj, la vilaĝanoj kaj laboristoj tre baldaŭ seniluziiĝis. Poste sekvis strikoj kaj aliaj protestoj. La opoziciuloj postulis radikalajn ŝanĝojn, malkontentaj estis Makedonoj, multaj Montenegranoj kaj Muzulmanoj ne volantaj esti konsiderataj kiel Serboj. Multaj ne-Serboj ektimis pri la superrego de Serboj en la nova lando, ne ĉiuj pretis akcepti la Serban reĝon aŭ monarkian regsistemon. Ankaŭ la najbaroj diversmaniere klopodis malstabiligi la novan ŝtaton.

Al iuj Slovenoj kaj Kroatoj la reĝlando sendube ekŝajnis kiel bona ŝanco por definitive disiĝi de Aŭstrio, respektive Hungario, kiel taŭga paŝo por iu estonta ekpaŝo al propra plena suvereneco.

Estiĝis pluraj problemoj kiujn la regantoj ne sukcesis solvi, kaj anstataŭ esti demokrata, la rego fariĝis diktatoreca. Kaj ne estas mirinde ke ekonomie, armile kaj morale nesufiĉe forta, la ŝtato ĉesis ekzisti en 1941 post la atako de Hitleraj armeoj. Dum la sekva milito denove okazis bataloj inter Serboj kaj Kroatoj, sed seriozajn konfliktojn travivis Serboj ankaŭ inter si mem.

La jugoslavismo kiel ideo tamen ne mortis. Anstataŭ la burĝaro ĝin resubtenis la komunistoj, kaj post la Dua mondmilito oni denove kreis Jugoslavion, ĉifoje kiel Federacian respublikon. Bedaŭrinde la nova reĝimo plene ignoris la antaŭan sistemon, kaj tuj aperis la nova historio, novaj herooj kaj monumentoj. Ĉio antaŭa fariĝis kontraŭpopola kaj malbona, dum ĉio nova estis taksata progresema, honesta kaj bonega. Reale okazis nur nova trompo de la naiva popolo. Aperis nova oligarkio, kiu eĉ pli ol lukse vivis, dum aliflanke pliiĝis la nombro de senlaboruloj, malriĉuloj kaj malkontentuloj. Nereale ambicia ekstera politiko, kaj ekonomie neefika kaj nacie erara interna politiko de la eksa prezidento Tito, kun granda kresko de la ŝtataj ŝuldoj kaj sufokado de ĉiuj postuloj pri la demokratiigo de la socio, ne povis gardi la ŝtaton de la nova katastrofo. En 1991 Jugoslavio denove disfalis, ĉifoje kun kruela civitana milito.



Eŭropa sonĝo de Jugoslavianoj

Fiasko de la kuneco

Dum plenaj 73 jaroj la loĝantoj de la unuaj du Jugoslavioj iel-tiel kontentige kunvivis, kaj anstataŭ persiste batali por demokrateco de la vivo, por pli da justo por ĉiuj loĝantoj, anstataŭ fortigi la komunecon laŭ sanaj ekonomiaj interesoj, la lastaj ŝtatestroj fakte decidis ĉion detrui. Sed - eĉ se vere necesa, kial tiu disiĝo ne okazis pace, kontrakte, en prudenta tempo, sen terura milito, sen viktimoj kaj ruinigoj ? Ĉu ne eblis ŝanĝi la federacian konstitucion ? Ĉu ne eblis transformo al konfederacio, unio, iu ekonomia nov-integriĝo ?

La estroj de ĉiuj el la estintaj respublikoj de S.F.R.J. ekludis la karton de naciismo. Ĉies gazetaro kaj la radio-televidaj elsendoj por ĉiuj problemoj kulpigis aliajn nacianojn. Oni forte subtenis malamon kaj venĝojn. Formiĝis danĝera militema atmosfero kaj nemirinde eksplodis tre kruela milito. Certaj strukturoj en la mondo ankaŭ vidis interesojn detrui Jugoslavion, sed ĉefajn rolulojn oni tamen devas serĉi en la propra medio.

Mallonga bilanco de la lasta milito :

- Pli ol kruelaj bataloj okazis en Kroatio kaj precipe en BkH. Krom multaj pereintoj (oni eĉ parolas pri la nombro de 200.000) la militon karakterizas grandegaj detruoj (pluraj belaj lokoj kaj urboj fariĝis nur ruinoj) kaj multnombraj rifuĝintoj (certe pli ol 1,5 milionoj). Multaj homoj, kiuj devis forlasi la domon, perdis la tutan havaĵon, la vunditojn neniu nombris, oni amase psike malsaniĝis kaj okazis multaj memmortigoj.

- Okazis teruraj etnaj purigoj de la terenoj en orienta Bosnio (viktimoj ĉefe Muzulmanoj), sed ankaŭ en Kroatio kaj sudokcidenta Bosnio (la viktimoj estas ĉefe Serboj). Okazis multaj masakroj de la civiluloj, kaj tiu ĉi milito certe ne estas glora por la sudaj Slavoj, kvankam ankaŭ iuj eksteruloj ne havas kialojn por fieri.

- La mondo konstatis ke Serbio



El la Mondo

plej kulpas pro la inspiro kaj vastigo de la milito kaj pro tio la novefondita Federacio de Serboj kaj Montenegranoj travivis severajn sankciojn de la mondo. La ekonomio de Serbio nun troviĝas en tre malbona stato, la reĝimo fariĝis aŭtokrata. En la lando okazas jam dumonataj protestoj de la opoziciuloj, studentoj, intelektuloj, senlaboruloj. La prezidento Miloŝeviĉ fariĝis potenca dank'al ruze gvidata nacia politiko, sed la celo »ĉiuj Serboj en unu ŝtato« reale ne povis efektiviĝi, kaj lia memregado nun ŝajne pasas. Antaŭ Serbio ankoraŭ restis la nesolvita problemo de la Albanoj en Kosovo.

- En Kroatio la naciisma politiko estis pli sukcesa, aperis sendependa kaj etne preskaŭ »pura« ŝtato, sed en tiu lando ankaŭ forestas demokratio kaj popola malkontento pli kaj pli kreskas. Slovenio kaj Makedonio kun nemulta peno fariĝis respublikoj de Eŭropo, sed veran bonstaton de »Okcidentanoj« ili ankoraŭ longe ne povos atendi. La salajroj de Slovenoj estas tamen kvaroble pli altaj ol tiuj en Serbio.

- Plej dubinda estas la estonto de Bosnio kaj Hercegovino. Ĉu tiu regiono retrovos la normalan vivon kaj evoluon aŭ iam ankaŭ disiĝos al du partoj aliĝontaj al Kroatio kaj la tria Jugoslavio - ne eblas certe profeti. En BkH grandnombre kaj tre miksite vivis Muzulmanoj, Serboj kaj Kroatoj, kaj multaj el ili sin antaŭe simple deklaris kiel »Jugoslavoj«. Tiu teritorio nun havas tri etne preskaŭ tute purajn partojn, dum pluraj sindonaj adeptoj de jugoslavismo, kiel suspektindaj al ĉiuj naciistoj, ĉefe pereis aŭ travivis diversajn persekutojn. Por savi BkH plej pezan taskon havos Muzulmanoj, kiuj unuavice devas esti Eŭropaj civitanoj kaj nur poste ankaŭ lojalaj adeptoj de la islamo.

Paŝo malantaŭen

En la fondo de la unua Jugoslavio ĉefan rolon havis la tiam libera Serbio, kiu troviĝis inter la venkintoj de la Unua mondmilito. La duan kreis fortaj komunistoj - regionaj venkintoj post la Dua mondmilito. Ambaŭ kreaĵoj aperis kaj organiziĝis sub ies volo kaj forto, sen sufiĉaj preparoj, kaj sen plena konsidero de la demokrataj rajtoj de la homo.

Bavario ne forlasas Germanion, Skotlando sukcese kunvivas en Britio, pluraj nacioj pli ol bonege vivas en Usono aŭ Svisio. Kial do disfalis Jugoslavio, aŭ Sovetio ? Ĉu komunisma ideologio, kaj sekva malriĉeco ĉefe kontribuis al tioma disflamo de la naciisma stulto ? Kiom influis la religioj ? Ĉiukaze montriĝis, ke naciismo ankoraŭ estas forta armilo, kaj tio nur povas vere tristigi la SAT-anojn kaj aliajn progresemajn homojn volantajn sennaciece senti, pensi kaj agi.

Post ĉio okazinta - iu nova Jugoslavtipa larĝa integriĝo certe ne povos okazi en sufiĉe baldaŭa estonto, almenaŭ ne, dum vivos la ĉefaktoroj de la disigo. Eble poste aperos ia Balkanio kiu inkludus ankaŭ Bulgarion, Hungarion kaj aliajn regionajn ŝtatojn, kaj tiu reale povus esti nur iu favora ekonomia komunumo.

Plej junaj membroj de Kroata Esperantista Unuiĝo, kursanoj en la bazlernejoj okaze de Kristnasko kaj Novjaro direktas ĉi mesaĝon al siaj samaĝuloj tra la mondo.

KARAJ SAMAĜULOJ,
Pluraj samaĝuloj en nia lando suferis dum la militaj jaroj. Infanoj kiuj restis sen patroj, hejmoj, parencoj, plej bone scias kaj memoras la teruraĵon nomata milito.
Ni ne deziras ke iu ajn en la mondo plu suferu pro ĝi. Ankaŭ ni ne deziras militon en niaj ludoj, ni ne deziras »militkapti« kaj »mortigi« niajn amikojn dum niaj ludoj. Ni deziras pacon dum ludado, pacon en la mondo.

Ni invitas vin, ke ankaŭ vi forĵetu militludilojn.


SAMAĜULOJ,
ni kune invitu niajn gepatrojn ke ili pli da tempo pasigu kun ni, ke ili ne provu aĉeti amon donacante militludilojn. Ili ebligu al ni pacan kaj senzorgan infanaĝon dum kiu ni povus ekkoni kulturajn kaj naturajn belojn de niaj kaj aliaj landoj.

Ni ankaŭ invitu ŝtatestrojn, ke ili aŭskultu niajn voĉojn kaj finance malapogu tiajn industrion kaj vendistojn.

Finante ĉi mesaĝon, ni deziras al ĉiuj Feliĉan Kristnaskon kaj pacan Novjaron en varmaj hejmoj kun senlima gepatra amo.

Zagrebo, decembro 1996

Junaj membroj de Kroata Esperantista Unuiĝo



El la Mondo

HISPANIO

KIAM LA VORTOJ ELĈERPIĜAS

La sensukcesaj diskutoj estis la kialo, kiu puŝis pli ol cent laboristojn de la ŝipkonstruejo "NAVAL Xixón" (pron. nabal ŝiŝon) al sturmo kontraŭ la oficejoj de Duro Felguera (pron. duro felgera).

Je la deka horo matene, la dekkvaran de januaro, pli ol cent laboristoj de la ŝipkonstruejo eliris el sia laborejo armitaj per palisoj, marteloj kaj aliaj diversaj iloj, konvene maskitaj, kaj eniris en la oficejojn de Duro por tie detrui la meblaron, telefonojn, komputorojn kaj aliajn instalaĵojn. Dum la agado, flamanta pneŭmatikbarikado malebligis la intervenon de la polico.

La laboristoj de Nabal Xixón finis antaŭ unu jaro kaj duono longan konflikton, kiu daŭris kvar jarojn, por ne perdi siajn postenojn. Fine de la pasinta jaro ili reekmobiliziĝis, kiam la entreprena grupo Duro Felguera vendis 50 % el la ŝipkonstruejo kontraŭ unu peseto. Ene de la nuna protesto kontraŭ la mastraro, la laboristoj



La laboristoj de Naval Xixón detruas la enirejon de la oficejoj de Duro Felguera

volis, per tia agado, postuli de la entrepreno la pagon de la ŝuldo da 550 milionoj da pesetoj, sen kiuj ne eblos produktigi la ŝipkonstruejon. Tio signifus la maldungon de ĉiuj laboristoj.

Certe multaj kriis pri la "barbareco de tiaj perfortuloj". La simpla saĝeco, tiu de la krudaj laboristoj scias ke je problemoj radikalaj estas nur solvoj radikalaj...

Snajpero



LIBERECANA FRAKCIO DE S.A.T.

IBERA ANARĤIISTA FEDERACIO

La Ibera Anarĥiista Federacio okazigis dum pasinta novembro konferencon dum kiu oni decidis subteni kaj disvastigi Esperanton. Por tio, IAF decidis rilati kun tiuj grupoj proksimaj al ĝiaj idealoj. IAF invitas ĉiujn interesatojn sendi artikolojn* por ties organo "Tero kaj libereco" (Tierra y Libertad), kiujn ili tradukos kaj publikigos dulingve por helpi la lernadon. IAF ankaŭ intencas publikigi E-kurson. Pro tio ĝi petas informojn pri facila kurso, taŭga por publikigo en la ĵurnalo. Al tio oni aldonu intencon eldoni kompletan lernolibron kunlabore kun iu eldonejo de la Liberecana Movado.

IAF salutas vin ĉiujn plej fratece.

* Se iu interesato decidas sendi artikolojn , IAF petas ke ĝi estu sur disketo kaj uzu iun ajn tekstoprilaboran programon : Wordperfect, Word por Windows, Microsoft Word, ktp.

Kontaktu : Francisco HENARES
Apd. 35096
ES-08080 Barcelona

HELPO AL LA ASOCIO

En Aŭstrio (ATS) D-ro K. Karner 20,00; L. Patek 20,00; S. Dendel 220,00;

En Francio (FRF) Ge-Prevost 120,00; F. Cortes 30,00; A. Nové 210,00; J. Dequaire 150,00; R. Bouchet 60,00; M. Maurin 60,00; P. Pialla 500,00; R. Hardy 160,00; D. Offredi 100,00; E. Dazun 710,00; R. Magnani 10,00; A. Espanol 60,00; F. Pellegrino 20,00; N. Martinez 30,00; C. Haren 100,00;

En Pollando (PLZ) Dabek 1,70; Bogdziun 16,70; Janusz 1,70;

En Svedio (SEK) G. Coste 50,00; Ge-Jonasson 75,00; E. Erlandsson 200,00;



XX° I.W.A. CONGRESS
CONGRESO A.I.T.
I.L.A. KONGRESO

De la 6-a ĝis la 8-a de decembro okazis en Madrido (Hispanio) la XX-a kongreso de la Internacia Laborista Asocio, en kiu partoprenis pli ol 300 gedelegitoj kaj observantoj el ĉirkaŭ 50 organizoj. Sep novaj sekcioj (Portugalio, Ejrio, Ĉeĥio, Niĝerio, Bulgario, Rusio kaj Ĉilio) estis akceptitaj dum la kongreso.

Krome ekzistas novaj por-ILA-grupoj en kelkaj landoj. Malĝojiga punkto estas la ĉeesto de la franca (CNT) kaj itala (USI) sekcioj, skismiĝintaj, kaj la CNT-Parizo kaj USI-Romo estis eksigitaj el la organizo.

Dum la kongreso, Esperanto estis fakte uzata, kvankam ne oficiale, kiel laborlingvo en iuj komisionoj, kaj la bulgara sekcio eĉ prezentis sian rajtigilon redaktitan en Esperanto.

Propaganda kunveno de geesperantistoj servis por informi la interesatojn kaj organizi ian kunordigitan agadon ene de la sekcioj, cele al fakta uzado de Esperanto en la Internacio.

Laŭ propono de FAU (Germanio) kaj CNT-oj (Francio kaj Hispanio) kun subteno de plimulto el sekcioj, la kongreso aprobis punkton laŭ kiu la Internacio, sen forlasi la oficialecon de la angla kaj hispana kiel laborlingvoj, instigas la sekciojn al propagando kaj uzado de Esperanto inter la sekcioj.

Ĉu nur bonintencaj vortoj aŭ efektivaj agoj ?

* * *

La kunvenintaj geesperantistoj alvokas ĉiujn SAT-anojn, kiuj apartenas al iu el la ILA-sekcioj aŭ simpatias kun ili, al pliintensigado de la laboro cele al efektiva aplikado de la kongresa decido rilate Esperanton.

Ni ne lasu preterpasi tiel bonan okazon !

Snajpero

El niaj fratorganizoj - L.E.A-oj

Redaktoro; produktisto; distribuisto:
Alan Gould
Woodrising, Thorn Lane
Goxhill, North Lincs.
Anglio DN19 7LU
Tel: +44 (0)1469 530356
E-Mail: alan@agolince.demon.co.uk

LEA LIGILO
Informilo inter L.E.A.-oj de S.A.T.
"La LEA-oj mem decidas pri la enhavo"

Statutaj, celaj, financaj kaj osteraj komunikoj
Ron Lynn
15 Canterbury House,
Royal St., LONDON
Anglio SE1 7LN
Tel:+44 (0)171 620 2950
E-Mail: rlynn@cix.compulink.co.uk

Unua Eldono - Februaro 1997

Ĵus aperis la unua numero de "LEA-Ligilo", kies nomo bone indikas sian celon. Pere de ĝi, la kontaktoj inter niaj LEA-oj, inter LEA-oj kaj LEA-Komitato estos multe pli simplaj kaj espereble pli efikaj. Ĝin ricevados ĉiuj LEA-oj kaj ties respondeculoj. La paĝoj de LEA-ligilo estas malfermitaj al ĉiuj iniciatoj kiuj povus plibonigi la agadojn de LEA-oj kaj diskonigon de Esperanto kaj de SAT en progresemaj kaj laboristaj medioj.

Ni gratulas al iniciatintoj kaj deziras al LEA-ligilo longan kaj efikan vivon.

BONVENON AL DU NOVKREITAJ L.E.A.-OJ

ITALIO

ITALA L.E.A.

En sia 1-a Jarkunveno, okazinta en Bolonjo, Italio, la unujara Itala LEA decidis akcepti Gotenburgan konvencion kaj aliĝi al LEA-komitato de SAT. Ni tre ĝojas kaj bonvenigas nian novan fratorganizon, dezirante al ĝi bonvenon kaj esperante pri bona kaj efika kunlaboro. La unua oficiala prezentiĝo de la nova LEA kadre de la LEA-komitato okazos ĉi-somere, kadre de la SAT-kongreso en Augs-burg, Germanio.

Itala LEA eldonas periodaĵon titolitan "ILEA-informilo", plejparte en la itala lingvo, sed kiu baldaŭ entenos ankaŭ diversajn informojn en Esperanto.

<u>Prezidanto de itala LEA</u> :
K-do Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina RM, Italio.
Sekretario :
K-do Giancarlo Rinaldo, via Savonarola 65, IT-35137 Padova, Italio.

RUSIO

RUSIA L.E.A.

La unuan de februaro 1997, dum la Fonda Konferenco en Moskvo, estis kreita rusia L.E.A. sub oficiala nomo "Popola Rusia Esperanto-Movado" - PREM.

Ni citas nur la du unuajn punktojn de ĝia Statuto:

"A) popola Rusia Esperanto-Movado (PREM) estas libervola socia organizo, unuiganta esperantistojn de demokratia maldekstra orientiĝo cele al kunordigo de ilia laboro, interŝanĝo de opinioj inter esperantistoj de diversaj politikaj tendencoj en Rusio kaj propagando de la lingvo Esperanto kaj idealoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) por, precipe, ruslingvanoj.

B) PREM kunlaboras kun SAT surbaze de la principoj, difinitaj en Konvencio inter SAT kaj tiamaj laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj) ĉe la VIII Kongreso en Gotenburgo-1928."

Ni esperas ke tre baldaŭ la nova LEA fariĝos membro de LEA-Komitato kaj ke jam dum la kongreso en Aŭgsburgo ĝi aktive partoprenos en la laboro de la sama Komitato.

Ni deziras sukceson kaj longan vivon al PREM.

LEA-oj ! - UZU VIAJN KOLUMNOJN EN SENNACIULO.

Ideoj : Por revigligi nian asocion

En la numero de Januaro 1997 de »Sennaciulo«, K-do Pelle PERSSON memorigis la paragrafojn de nia statuto pri la konsisto kaj taskoj de la Ĝenerala Konsilantaro kaj lanĉis alvokon por ĝia plivigligo . Mi tute aprobas ĝin kaj ĝojas pri lia artikolo. Laŭ mi, tiu propono estas unu el la ĉefaj rimedoj por kontraŭstari la malkreskon de nia asocio.

En ĉiu kongreso, ni devas konstati malĝoje, ke la nombro de la aliĝantoj malkreskas kaj ke la averaĝa aĝo altiĝas. Tiu situacio postulas de ni energiajn decidojn kaj veran savplanon por SAT, ĉar se ni plu lamentos sen ŝanĝi ion ajn, la asocio iom post iom mortos.

SAT, per sia statuto, havas rimarkindajn rimedojn por esti vigla. Mi tuj mencios kelkajn el ili: Plenumkomitato, Ĝenerala Konsilantaro, LEA-oj, Frakcioj ktp... El tiuj kvar rimedoj vigle funkcias nur la Plenumkomitato. Mi zorgas do pri la aliaj.

1) La Ĝenerala Konsilantaro estas nia mondskala instanco. Ĝi povus, se ĝi funkcius, doni gravan impulson al nia sennacieca agado, multe pli ol la Plenumkomitato respondanta pri multaj administraj aferoj kaj konsistanta el francianoj, eĉ parizanoj.

2) Niaj LEA-oj travivas malsimilajn situaciojn. Ŝajnas al mi, ke mankas al ili regula komunikilo, informilo inter ili. Tial la projekto de LEA-ligilo, starigata de K-doj GOULD kaj LYNN estas tre interesa. Mi ankaŭ ĝojas, ke fondiĝis itala LEA kaj eble kreiĝos LEA en Rusio kaj restariĝus iu asocio en Nederlando.

3) Frakcioj estas fenestro al neesperantista progresema mondo, kiu batalas por pli bona mondo. Antaŭ kelkaj jaroj funkciis vere nur la Liberecana Frakcio, kiu rimarkinde plu plugis sian sulkon. Sed nun kreiĝis en 1993 la Komunista Frakcio, aktivis denove la Frakcio por Disdona Ekonomio, ĵus revekiĝis la Sennaciista Frakcio. Eble aperos aŭ reaperos aliaj frakcioj.

Kunligi tiujn diversajn rimedojn estas miaopinie nia fundamenta devo. Tio postulas samtempe iniciatemon, toleremon kaj interesemon . En tiu-ĉi taskaro, ni bezonos ĉies bonvolon.

Vincent CHARLOT (34828)

Pri klasbatalo kaj aliaj problemoj

Jam de 36 jaroj mi laboras. Bedaŭrinde dum jaroj mi devis, vole ne vole, konstati, ke pli kaj pli la laboristaro troviĝas en senelireja situacio kiun ili ne povas ŝanĝi aŭ solvi per nura klasbatala agado.

Ni ĉiuj devas konstati ke la politikistaro fulmrapide adaptiĝas al novaj tendencoj kaj situacioj kiuj povus ŝanceli ilian potencon. Ekzemple la »Verdaj partioj« helpe de organizoj kiel »Greenpeace« ŝanĝis la pensmanieron de precipe la okcidentaj socioj. Eĉ la plej potencaj politikaj partioj adaptiĝis al la nova penso. Mi povas doni alian ekzemplon.

En Belgio, kaj precipe en la flandra parto de la lando, kreskas la potenco de la ekstrem-dekstra politika partio »Vlaams Blok«. En la urbo kie mi loĝas, la »Vlaams Blok« iĝis la plej granda partio. 25% de la Antverpenanoj voĉdonis por »Vlaams Blok« dum la lasta balotado. Ĉiuj aliaj politikaj partioj devis formi monstran koalicion por venki la plej grandan partion, kiu nun estas en Antverpeno »Vlaams Blok«. Tamen, granda TAMEN, vole ne vole, oni devis doni al »Vlaams Blok« certajn mandatojn kaj tial Marijke Dillen (Vlaams Blok) iĝis la prezidantino de la kulturkomisiono de la provinco Antverpeno. Jam post unu monato la »Vlaams Blok« decidis pri la preskaŭa neniigo de subvencio al »progresemaj asocioj«.

Ĉiuj progresemaj maldekstre tendencaj asocioj timas perdi la subvencion, (Vlaams Blok agas kontraŭ komunistoj, liberecanoj, nigruloj, Turkoj, Marokanoj, kontraŭ ĉiu kaj ĉio, kiu ne estas blanka kaj flandra)

Ankaŭ Esperanto ricevas frapon. Sub premo de Vlaams Blok, la socialista ministro de internaj aferoj, Van De Lanotte, ŝanĝis la subvencidekreton tiamaniere ke malpli da asocioj povas profiti subvencion. Ĉu prave, ĉu ne, ĉu tro da asocioj profitas, mi pridubas, sed terure estas, ke asocioj nur povas ricevi subvencion kiam ili parolas kaj uzas la nederlandan lingvon. Por esti pli klara, la Flandraj Esperantaj Asocioj devas, kiam ili kunvenas, zorgi ke interpretisto partoprenas la prelegojn aŭ debatojn, faritaj Esperantlingve, por ke li povu traduki la Esperantajn tekstojn al la nederlanda lingvo.

Priplorinde estas, ke F.E.L.(Flandra Esperanta Asocio) la kupola organizo, ŝanĝis la statuton adaptinte ĝin al la novaj dekretoj. Nur mi kontraŭvoĉis kaj ne volis sekvi F.E.L.. Mi rifuzis, pro la novaj dekretoj, preni novan trijaran mandaton kiel prezidanto de la Antverpena klubo. Bedaŭrinde la membroj ne respektis mian decidon kaj du semajnoj antaŭ la fino de mia mandato la novaj estraranoj demandis min ke mi silentu kaj foriru kun mia salivo pri antirasismo, toleremo kaj aliaj "ŝercoj".

Klasbatalo ? Montru la klasojn al mi. Ne plu temas nur pri riĉaj kaj malriĉaj, sed mono kaj potenco restas la plej gravaj elementoj. Klasbatalo estas same »pia deziro« kiel »progresemo«.

RECENZO - "CIKATRO DE AMO" - 113-paĝa libreto broŝurita pri elektitaj verkoj de Vasilij Eroŝenko, vol.6. Tradukitaj en Esperanto de SHI Chengtai kaj Guozhu. Eldonis: Japana E-Librokooperativo.

***

"Cikatro de Amo" estas kolekto de kvar fabeloj :
- La tragedio de kokido
- Averto de l'Tempo
- Cikatro de Amo
- Ruĝa floro

Ili estis japanlingve verkitaj en Pekino (1922-1923) de Eroŝenko, blinda rusa poeto (1890-1952).

Oni vidas grandan diferencon inter la unua novelo kaj la tri aliaj. Post la verkado de "La tragedio de Kokido, la aŭtoro reiris al Rusio, kiu transformiĝis al Sovetio dum lia restado en fremdaj landoj. Kiam li revenis al Pekino, li verkis la tri aliajn fabelojn. Oni supozas, ke en Moskvo kaj en sia hejmloko, li jam vidis negativan , malluman flankon de la bolŝevika revolucio. Li jam antaŭvidis minacon de la stalinismo, kaj aludis tion en tiuj ĉi simbolaj fabeloj, kie speguliĝas liaj ideoj : kiel apostolo de la homaranismo, li revis pri libera, feliĉa mondo, ploris, sopiris kaj indignis pro la popolo ofendata, insultata kaj maljuste vivanta.

Unuvorte, Eroŝenko amis la homaron pli ol sin mem kaj prenis la malĝojon de la homoj kiel la sian. Li estis mondcivitano, tamen li havis profundan nostalgion pri sia naskiĝloko. Li fine revenis en sian sopiratan hejmlokon, sur kies vasta stepo, li enspiris freŝan aeron de majo, aŭskultis kantadon de najtingaloj en densa arbaro.

Vi certe ŝatos tiun ĉi libron kun siaj malavaraj, riĉaj ideoj, sia muzika, poeziplena stilo kiu tuŝas nian koron. Kiel ĝia idealista verkisto, ni ankaŭ sopiras al "la veno de ŝipo portanta la homaron al la lando de feliĉo". Revo realigebla se, sur tiu ŝipo gravuriĝas la du vortoj : "Nur Amo"...

Michèle Freud


SAT-ano 100-jara

Nia dumviva membro, kamarado

KAWAMURA Seiziro - 27399

en lasta oktobro fariĝis 100-jara (naskiĝis en la jaro 1896). Kamarado Kawamura ankoraŭ fojfoje ĉeestas la kunvenojn de Esperanto-societoj en Kyoto kaj Uzi. Li estas ankoraŭ vigla kaj parolas klare. La ĵurnalo "Kyoto Sinbun" prezentis lin kun foto, en kiu la urbo Kyoto donacis al li memoraĵon okaze de lia centjariĝo, kaj kun jena komento : "Li instruas al junuloj unufoje semajne la internacian lingvon Esperanton kiun li lernis kiam li estis 26-jara."

Gratulon Kamarado Kawamura kun deziro pri ankoraŭ pluraj jaroj !



Manpleno da mono povas ŝanĝi homojn. Forprenu la altan salajron de la sindikatestroj kaj vidu kio restas. Don Kiĥotoj kaj aliaj idealistoj ne oftas, bedaŭrinde.

Ni reprenu la Statuton de S.A.T. kaj konstatu, ke la plej grava celo estas "lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj".

Kun la arkaika vorto klasbatalo ni ne varbos novajn membrojn. Sed edukado kaj racia pensado povas helpi homojn, kiuj volas forlasi la mondon de MacDo kaj aliaj Do-aĉaĵoj.

Jacques Schram

Reto-Klubo por Esperanto-parolantaj infanoj



En Interreto malfermiĝis »Reto-Klubo de Esperanto-parolantaj infanoj, geknaboj kaj dekumuloj«. Ĝi celas esti loko por geknaboj kiuj konas Esperanton, ne por tiuj kiuj ankoraŭ lernas ĝin (kvankam tiuj estas bonvenaj por ĉion legi aŭ ludi).

Ĉiu Esperanto-parolanta infano (ĝis 18jara) kiu estas atingebla per elektronika poŝto, povas havi tie paĝon por prezenti sin kaj siajn interesiĝojn. Krome tie troviĝas (ankoraŭ ne tre multaj) paĝoj kun ludoj, versaĵoj, kantoj por diversaj aĝoj kaj »ligoj« (transsendoj) al aliaj lokoj en Interreto kie troviĝas tekstoj aŭ aliaj aferoj interesaj por ili. Per »afiŝejo« la geknaboj povas sendi mesaĝojn al ĉiuj legantoj. Ekzistas speciala fako por »denaskuloj« (ankaŭ pli aĝaj ol 18j).


La adreso de la ĉefa ttt-paĝo de la Reto-Klubo estas:
http://www.geocities.com/EnchantedForest/2755/

Geknaboj kiuj estas atingeblaj per e-poŝto, sed ne disponas pri ttt-konekto, povas anonci sin al: retoklubo@geocities.com.

Anoncaĵoj pri literaturaj/artaj eventoj povus esti interesaj por meti en la mesaĝotabulon de la Esperanto-Literatura Kafejo.

Se estus anoncaĵoj interesaj por Eo-parolantaj infanoj (ĝis 18j) aŭ por denaskuloj, ili povus esti en la mesaĝo-tabulo de la Reto-Klubo.

Novaĵoj tra INTERNET



RUSIA ESPERANTISTA KONGRESO
De la 31.01.-02.02.97 okazis en Moskvo Rusia Esperantista Kongreso kun 75 personoj el 23 urboj de Rusio, kaj gastoj el 5 urboj de Ukrainio, el Litovio, Finnlando, Portugalio, Hungario, Germanio. La ĉeftemo de REK estis "Patroj kaj filoj en nuna Esperantio".
Krom REU-konferenco, okazis pluraj aliaj kunsidoj: de Rusia ILEI-sekcio, de Rusia TEĴA-sekcio, de TAKE-membroj, KEK-membroj. Kunveno de rusiaj membroj de SAT kaj ERA transformiĝis je fonda konferenco de politike neneŭtrala rusia asocio, ricevinta karakterizan nomon PREM (Popola Rusia Esperanto-Movado), kiu celas propagandi Esperanton en progresemaj demokratiecaj kaj maldekstraj politikaj partioj kaj parlamentaj frakcioj, en sindikatoj, ktp.

Ricevita de : eventoj@hungary.net.

ESPERANTO CD-ROM
EspeRom nun estas finita. Ĝi estas la unua Esperanta CD-ROM. Vi povas mendi ĝin kiel aldonaĵon al via periodaĵo. Ĝi kostas nur 1 USD por ekzemplero (do se via eldonkvanto estas 500 ekz. tio estus 500 USD).
Enhavo : La Lingvo, Kursoj, Gramatiko, Vortaroj, Muziko, Radio, Organizaĵoj, Eventoj, Gazetoj, Legaĵoj, Bibliotekoj kaj Libroservoj, Biblio, Internet.
Vi povas aŭdi 6 horojn da muziko kaj 12 horojn da teksto, vidi etajn filmojn kaj informiĝi pri Esperanto.
Tiu ĉi CD-ROM estas por PC-komputoroj. Estas necesa: 486-66 Windows 3.x aŭ Win 95, Soundblaster-kongrua sonkarto. Testdisko kostas 16 DEM (10 USD).

Ricevita de : meierfr@uni-muenster.de


SUBTENO AL BEOGRADAJ STUDENTOJ
Temas pri perretpoŝta subtenkampanjo lanĉita en Germanio por Beogradaj gestudentoj kiuj jam de multaj semajnoj ĉiutage provas per ideplenaj agoj atingi demokratiajn reformojn en Serbio. Krome oni volas plifortigi ilian voĉon kompare al la daŭre naciismemaj polgvidantoj Draŝkoviĉ kaj Djindjiĉ. (Draŝkoviĉ pledis aňkoraŭ antaŭ kelkaj semajnoj por Granda Serbio kaj Djindjiĉ estis ĝis antaŭnelonge bona amiko de Radovan Karadĵiĉ).
Bonvolu sendi ĉi-suban tekston en via nacia lingvo al la sekva retadreso : *protest96@galeb.etf.bg.ac.yu*
"Karaj amikoj,
Ni plene subtenas la studentan proteston, iliajn agadojn kaj postulojn por la demokratio kaj justeco. Viaj agoj estas bona ekzemplo por la tuta mondo. Daŭrigu vian proteston pace por ke demokratio venku denove.
Amikoj el la tuta mondo!"

Ricevita de : Juan-Antonio.Del-Castillo-Martinez@CENTRAL.DGIP.meh.es

LITERATURA KVIZO DE POLA RADIO
Unu el la verkoj de konata pola verkisto Boleslav Prus pritraktas la vivon en la antikva Egiptio.
1) - Kiel estas titolita la romano?
2) - Kiu tradukis ĝin en Esperanton?
3) - Ĉu en via nacia lingvo troviĝas la traduko de ĉi tiu romano?
Se iu divenis la titolon, kaj eventuale eĉ legis la romanon, tiu povas skribi al ni kelkvorte sian opinion pri la enhavo
4) - Mia opinio pri la enhavo de la romano.
Per tio li/ŝi partoprenos la lotumadon de kromaj premioj. Do respondante al la unua kaj kvara demandoj vi dufoje partoprenos la lotumadon de premioj. Sed por partopreni la kvizon sufiĉas respondi nur al la unua demando.
La respondojn oni sendu al: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-977 Varsovio, poŝtfako 46, Pollando, Aŭ fakse: 48+22-645-59-17; 48-22-645-59-19, aŭ rete: pettyn@radio.com.pl - ĝis la fino de marto.
La rezultojn de la kvizo kun la nomoj de la premiitoj oni anoncos la 4-an de aprilo, en la tago de la naskiĝo de la E-elsendoj de Pola Radio. Tiam la elsendoj fariĝos 38-jaraĝaj.
Ni petas ĉiujn retanojn diskonigi la kvizon inter la geamikoj, samklubanoj, ktp. kaj kompreneble ni invitas ĉiujn partopreni la kvizon.
La premiojn konsistigos MAZI-kurso de Esperanto (unua parto), surkasedigitaj E-romanoj, "Humuro laŭ la skota maniero" (en tri kasedoj), nova muzikkasedo kun E-kantoj, E-libroj, ktp.
Ni antaŭvidas pli ol 100 belajn premiojn.
Do, ni invitas vin partopreni la kvizon kaj deziras al vi bonŝancon en la lotumado de la premioj!

Pola Radio
Esperanto-Redakcio

Ricevita de : pettyn@radio.com.pl



TTT-paĝo de Sveda L.E.A.

NE FORGESU SUBTENI SAT SUR INTERNET !
@ @ @ @ @ @ @ @ @ @@



70-a Kongreso de S.A.T.

02.-09.08.1997 en Augsburg

OKK :
Prezidanto : Hermann Schmid
Adreso : Esperanto-Press Augsburg, Hermann Schmid, Waterloostrasse 21, DE-86165 Augsburg,
Telefono el eksterlando : + 39.821.792835 ; el Germanio : 0821 / 792835 + 488149
Poŝtkonto : Hermann Schmid, Sonderkonto 86356 Neusäß. Postgiramt München Kto-nro 56 99 93-808 (Bank-kodo 700 100 80) por 70a kongreso de SAT 1997 - Augsburg.

KONGRESKOTIZOJ	**ĝis 1997.04.30**	**ĝis 1997.06.15**	**poste**
SAT-membro	100.-DEM	124.-DEM	10% pli
SAT-geedzoj	166.-DEM	206.-DEM	en ĉiuj
SAT-gejunuloj	60.-DEM	66.-DEM	kategorioj
Gasto	140.-DEM	176.-DEM	
Gast-geedzoj	198.-DEM	246.-DEM	

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas la kotizon


La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 30 % rabaton.
La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 50 % rabaton.
La aliĝilon bonvolu peti ĉe la adreso de la O.K.K.

DUA LISTO DE ALIĜINTOJ

28. R. Lynn (GB); 29. A. Legros (FR); 30. O. Masseron (FR); 31/32 E. kaj B. Raposo Martinez-Navarro; 33. A. Ter-Braak (NL); 34. M. Graenitz (DE); 35. T. Graenitz (DE); 36/37 K. kaj S. Lencki-Borremans; 38. E. Sandner (DE); 39. N. Vollegraaf (NL); 40/41. D. kaj S. Krombeen (NL); 42. J; v.Hulst (NL); 43. R. Correy (FR); 44/45 C. kaj M. Roux (FR); 46. E. Monier (FR); 47. A. Straif (AT); 48. V. Matuzeviĉiene (LT); 49. D. Beylot (FR); 50. A. Nordevier-Jagtenberg; 51. P. Persson (SE): 52. K. Klein (NL); 53. E. Janusz (PL); 54. J. Jankowski (DE); 55. N. Caragea (DE); 56.K.-E. Paech (DE); 57. D. Cibulevskij (UA); 58. E. Cibulevskaja (UA); 59. M. Hocke (DE); 60/61 G. kaj G. Léon (FR); 62. A. Prent (GB); 63. M.Hardy (FR); 64. H. Rodewig (DE); 65.F. Bues(DE); 66. T. Kapista (YU); 67. S. Stojkoviĉ (YU); 68. D. Jovanoviĉ (DE); 69. M. Olbina (YU); 70. V. Ogrebĉuk (UA); 71. L. Solomko (UA); 72. V. Gogova (BG); 73. G. Damjanov (BG); 74/75 D. kaj D. Ivanovi (BG); 76. M. Scherm (DE).

ATENTU : Loĝkategorio D - eklezia instituto St. Hildegard estas okupita. Ne plu estas lokoj.

ATENTIGO AL NIAJ LEGANTOJ :
Resumo de ĉiuj alvenintaj reagoj pri la "Publika letero al KEK" aperos en aprila numero.



Zeughaus, iam arsenalo.Nun kleriginstituto por plenkreskuloj - "Popollernejo"

★

ESPERANTO
SENNACIECA LINGVO

EL ESPERANTO-MOVADO

❒ Kvina Esperanto-Semajno" - por la Kulturo kaj turismo okazos de la 4-a ĝis la 11-a de oktobro 1997 en Sant Carles de la Rapita (Tarragona). Ĉiujn informojn vi povas peti al : Hispana fervojista Esperantista Asocio, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona. Tel. (93)7275021.

❒ Por konsulti kalendaron pri Esperantaj okazaĵoj vi povas konsulti la TTT-paĝon de la franca E-junularo (JEFO) sur Internet per la adreso: http://www.worldnet.fr/~mjb/jefo.

❒ La datoj de la internacia renkontiĝo de esperantistaj geedzaj paroj en Podebrady, Ĉeĥio, ŝanĝiĝis. Ĝi okazos de la 31.05. ĝis la 08.06.1997. Lokaj esperantistoj sukcesis konvinki la urbestron pri la utilo de Esperanto kaj li disponigos senpage la salonojn por la renkontiĝo. Ankaŭ la banejo donos certajn rabatojn. La programo estos vere bunta kaj jam nun alvenas aliĝiloj el diversaj landoj.

❒ Eŭropa esperanta Kultura Semajno - 10-19.05.1997 -(tri sinsekvaj aranĝoj):
- 10-13.05.97 - Esperanta Kultura Festivalo en Aalen (DE)
-13-16.05.1997 - Eŭropa Junulara Parlamento - paralele : ekskursa programo - en Stuttgart (DE)
- 16.-19.05.1997 - Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart (DE)

Ĉiujn informojn donas la LKK :
Esperanto Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart, tel. 0711/1388980, telekop.: 0711/1388982.

❒ La nombro de eŭroparlametanoj favoraj al Esperanto daŭre pligrandiĝas. Ĝi pligrandiĝis de 86 al 94 (14.12.1996), do 15 % pli.

❒ 42-a kvarnivela staĝo de parolata esperanto okazos en Thionville (nord-orienta Francio) de la 22-a ĝis 23-a de marto 1997. La situo de Thionville estas apud Belgio, Luksemburgio kaj Germanio. Prelegos Harald SCHICKE el Germanio, naturmedicina kuracisto, kaj Anton KIEFFER, vinberkulturisto el Palatinato (Germanio), prezentos siajn vinojn por la gustumado. Informas : s-ino Catherine GALLEGO, 49 rue du Général de Gaulle, FR-57330 Hettange Grande.Tel: +33(0)3 82 53 05 51; Telekop.: +33(0)3 82 54 20 10.


S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ!

STRIKO EN KOREIO



EDZIĜOJ




Ne filo, ne ! La ringojn ! La aliajn ringojn !